

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale  
PLENUMITA 30/01/2020 Kvarcentsesdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **751,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **282,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **254,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **215,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

### Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro.105



Per la Demanda Propozicio oni volas orientiĝi pri io. La modo estas normale la Indikativo. Tamen oni trovas ankaŭ la Volitivon aŭ la Kondicionalon: "Kiun lokon mi legu al vi?" kaj "Kial homoj ne povus fini militi!". Sed kutime la Demandan Propozicion enkondukas aŭ la subjunkcio "ĉu" aŭ unu el la tabelvortoj demandaj. Ĉe "ĉu" oni povas subkompreni la ĉefpropozicion :Mi demandas ...." aŭ ion similan, por esti gramatike ĝusta. Ne malĝustaj, sed evitindaj, estas demandoj kiaj "Kiu kiun mortigis?", kaj "Pro kio multe ci forĵetis?". Akcenti la demandon oni povas per "nu" aŭ "do".



*Marcel Leereveld.*



La konto 'espero' ĉe uea pretas finance helpi per malgranda sumo la esperantistojn, kiuj perdis sian domon aŭ suferis similajn problemojn en la grandaj ĉi-jaraj brulegoj. Niaj helpoj

Universala Esperanto-Asocio



Logo of UEA

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

estas de tre malalta nivelo (200 aŭ 300 eŭroj), sed ni faras kion ni povas. Temu nur pri esperantistoj, kies esperantiteco estos konfirmata de la landa asocio.

Amike uea, konto 'espero' informis Renato Corsetti



## Viktimoj de arbustaj fajroj



Se iu perdis sian domon pro la grandegaj arbustaj fajroj en Aŭstralio, eble la plej utila donaco estus provizora dometo donate al ili el registara mono aŭ/kaj el la publika fonduso kiun oni kolektis de la bonfaruloj en la mondo.



Pro tia donaco oni povus vivi sur sia terpeco dum iuj reparos la brulitan domon. Eble oni povos uzi tiujn grandajn ŝtalajn ujojn uzatajn por la ŝipoj. Aŭ uzu la konstruistojn de malgrandaj dometoj celataj al la geavoj.

Roger Springer



## La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo



atendos vin.

La 1a de Februaro estos la unua sabato de la monato. Venu!

Roger Springer



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Ordo en mia ĝardeno .

### VORTORDO .

Plu al mia artikolo pri vortordo en Esperanto, mi donas jen kelkajn pliajn ekzemplojn de necesaj limigoj en la lingvo.

1). Adjektojn en la formo de prepozitivoj oni ne metu inter la subjekto kaj la verbo, ĉar oni ne scius ĉu la prepozitivo estas adjekto, aŭ ĉu komplemento ĉe la subjekto. Ekzemple "La najbaro FORPRENIS mian biciklon DE LA INFANO" kaj "LA NAJBARO DE LA INFANO forprenis mian biciklon", kun du malsamaj signifoj. Kaj "LA AŬTOMOBILO DE MIA FILO sendatis al mi" kaj "La aŭtomobilo SENDATIS DE MIA FILO al mi", kiu lasta frazparo havas tri diversajn signifojn. Do atentu ke vi metu la prepozitivojn en la ĝustajn lokojn!

2). La adverbo difinanta adjektivon aŭ adverbbon ĉiam venas unue: sufiĉe varma; tro rapide; ( sed malantaŭ sia substantivo: la vojo tie); kaj kutime ankaŭ antaŭ prepozitivo: ekzakte en la mezo. Sed prepozitivo kutime sekvas: la turo en la mezo, afabla al ĉiuj; senti per la fingroj, rapide laŭ eblo.



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

3). Rilataj pronomoj kaj adverboj normale sekvas tuj sian antecedenton, escepte kiam ĉi lasta sekvas de prepozitivo: la vilaĝo kie mi naskiĝis, la vilaĝo en la montaro kie mi naskiĝis.

4). Demanda frazparto (inkluzive de la predikativo) venas ĉiam en la komenco de frazo: en kio konsistas cia peto?; kio estas lia metio?.

5) Kiam troviĝas du verboj en unu predikato, la komplementoj kutime venas tuj post sia verbo, escepte ne post la modaloj: li ŝatis multe trinki bieron kaj li ŝatis trinki multe bieron. Sed: mi povos veni pli frue; sed : ci devas ne manĝi tion kaj ci ne devas manĝi tion (sed rajtas).

6). Notu la diferencon: Mi lasis manĝi la kokinon, kaj Mi lasis la kokinon manĝi. Ankaŭ: Ŝi igis la infanon lavi per sapo kaj Ŝi igis lavi la infanon per sapo (pli bone: Ŝi igis la infanon lavati per sapo).

7). Ekzistas kelkaj adverboj, nomitaj adjektivaj adverboj aŭ ligitaj adverboj, kiuj difinas iun ajn parton de la frazo sole (kaj starante antaŭ tio) aŭ la tutan frazon. Konsekvence la loko decidas la signifon de la frazo. Ekzemple en la jena frazo (kopiita el PAG): 1). Ŝi dancis hieraŭ en la korto ankaŭ; 2). Ŝi dancis hieraŭ ankaŭ en la korto (krom en la ĉambro); 3). Ŝi dancis ankaŭ hieraŭ en la korto (krom hodiaŭ); 4). Ŝi ankaŭ dancis hieraŭ en la korto (krom kanti); 5). Ankaŭ ŝi dancis hieraŭ en la korto (krom ŝia edzo). Jen aliaj: Li montris al mi la leteron eĉ (k.t.p.); Ili aprobis la principon almenaŭ k.t.p.; Mi donis al la infano la balonon sed ne la vipon (k.t.p.); La filo penis helpi hodiaŭ almenaŭ sian fraton (k.t.p). Notu ankaŭ la diferencon inter "Li ne plu manĝas (= "jam ne)" kaj "Li plu ne manĝas (= ankoraŭ ne)" kaj "Li ne jam manĝas (= plu ne)" kaj "Li ne ankoraŭ manĝas".

**Marcel Leereveld.**

## LA STRANGA MONDO NIA .

Oni diras, ke ŝtato estas kvazaŭ familio, kaj en militoj oni defendas la familion. Mi samopiniis kun tio, kaj se mia ŝtato ne agas kiel familio, mi ne defendos ĝin, nek en milito nek alioke. En familio ĉiuj havas la samajn rajtojn. Ĉiuj ricevas la saman kvanton da nutraĵo. Ĉiuj ricevas la saman kvanton da ludiloj, da lerniloj, kaj da laboriloj. Ĉiuj membroj donas similan kvanton da laboro necesa. Neniu membro havas politikajn aŭ ekonomiajn sekretojn. Ĉiu membro rajtas scii, kiom posedas la aliaj membroj. Ĉiu membro defendas la familion. Neniu homo prenas pli da mono el la ŝtato ol alia homo. Neniu homo havas pli da posedaĵoj ol alia homo. Neniu homo aŭ korporacio de alia familio rajtas ŝteli el nia familio. Ĉiuj membroj de mia familio defendos nian familion kontraŭ ekonomiaj mililitoj kontraŭ mia familio. Ne estas permesata ke mia najbaro estas miliardulo (li vere estas) kaj mi nur milionulo, nek ke mi estas milionulo dum mia alia najbaro estas nur dekmilulo. Se tioj ne estas permesataj, mi defendos mian familion, mian ŝtaton. Dependos de ni ĉiuj, ĉu nia familio, nia ŝtato, estas en familia stato kaj tial defendinda.

**Marcel.**

## KONJUNKCIOJ, SUBJUNKCIOJ, DEMANDVORTOJ .

Imagu ke vi rakontas al aliaj ion kio okazis hodiaŭ matene en via strato. Vi povas fari tion en tri malsamaj manieroj. Unue vi povas rakonti la okazon per via buŝo; ĉiufoje kiam la situacio ŝanĝiĝas, vi diras la okazon per longa aŭ mallonga frazo, kaj vi eble bezonis dek

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

frazojn. Anstataŭe vi povas skribi la dek frazojn, tiujn kiujn vi volis sed ne povis diri en la parolata lingvo. Tiukaze vi komencas ĉiun frazon per ĉeflitero, dum en la parolata lingvo via tono plimalaltiĝis ĉe la fino de ĉiu frazo. Notu ke vi bezonas novan frazon ĉiam kiam la situacio ŝanĝiĝas. La vortoj en la skribita lingvo povas esti la samaj kiel tiuj en la parolata lingvo (sed se vi volas vi povas uzi malsamajn lingvojn, ekzemple la anglan kaj Esperanton. Por la tria maniero vi faris dek fotojn, korespondaj al la dek frazoj. La dek fotoj do montras dek bildojn, kiujn vi estus povinta diri aŭ skribi. Se iu persono estas surda kaj krome ne povas legi la lingvojn kiujn vi uzas, ŝi aŭ li scios kio okazis nur per la bildoj. Sed mi ne estas tute surda, kaj mi lernintas la lingvon uzatan de vi. Kaj por montri, ke la dek frazoj formas unu rakonton, vi uzis malgrandajn vortojn inter la bildoj, inter la frazoj. Kiel jene: 1) Hodiaŭmatene je la sepa mi aŭdis la sirenon de fajrbrigado, 2) KAJ mi tuj iris al la strato. 3). POST LA ALVENO la brigadanoj tuj ligis la akvotubojn al la krano. 4) SED nek ili nek mi vidis fumon en la domoj; 5) TAMEN ili serĉis en ĉiu domo; 6) DO fine ili retroiris al sia garaĝo, 7) DUM mi retroiris en mian domon. 8) AŬ iu faris falsan alarmon, 9) AŬ iu persono intertempe estingis sian fajreton; 10) ĈU vi scias? Ĉiu el la dek frazoj/bildoi enhavas siajn Subjekton kaj sian Verbon kaj eventualajn Objekton kaj Adjektojn. La malgrandajn ligvortojn oni nomas KONJUNKCIOJ. Ili estas: kaj, aŭ, do, nu, nek, sed, tamen, tiam, tial, tiel, ĉar, dum, ĉu ..ĉu, ĉu .... aŭ, aŭ ....aŭ, kaj ... kaj, nek .... nek, ne nur .... sed ankaŭ, kaj multaj adverboj, kiaj alie, cetere, fine, dume, krome, male, malgraŭe, poste, same, nome, sekve, k.t.p.

Estas malfacila, klarigi la funkcion de la konjunkcioj, tiom ke naciaj lernolibroj ofte traktas la subjunkciojn kiel konjunkciojn. La konjunkcioj kunligas du samvalorajn frazojn. Samvaloraj, ĉar ambaŭ frazoj povas konsiderati kiel sendependaj frazoj simple kunligitaj. Konkludi pri tio estas plej simpla, se oni nomas la frazon post konjunkcio memstara frazo. La lernanto simple uzu la konjunkcion tie kie faras la aliaj parolantoj, kaj kiam la uzo normalas, ĝi estas ĝusta. Alivorte: vi uzu la konjunkciojn kiel aŭditajn kaj ne bezonas scii ke ili estas konjunkcioj kaj kion ili faras.

Tio validas ankaŭ por la subjunkcioj. Kie vi uzas ilin, ili enkondukas subordan frazon, kiu estas tiam frazparto de antaŭa aŭ posta ĉefpropozicio, ĉeffrazo. Jen ekzemploj: Mi scias, ke li venos (“ke li venos” estas la gramatika objekto de la ĉeffrazo “Mi scias”); Mi manĝos, ĝis mi satos (“ĝis mi satos” estas tempa adjekto de la frazo : “Mi manĝos”); Ke li ne sukcesis, estas plorinda (“Ke li ne sukcesis” estas la gramatika subjekto de la frazo “estas plorinda”); Mi legas, dum ŝi laboras (“dum ŝi laboras” estas tempadjekto en la frazo “Mi legas”). Mi manĝas, kvankam ŝi laboras (“kvankam ŝi laboras” estas limigadjekto en la frazo “Mi manĝas”); La viro agas, kvazaŭ li estas ebria; Mi kuniros kun ci, se ci permesas. Krome funkcias kiel subjunkcioj la rilataj pronomoj kaj adverboj kio, kia, kiu, kaj kies, kaj la rilataj adverboj kie, kiam, kial, kiel, kaj kiom. Ankaŭ funkcias kiel subjunkcioj la kombinitaj formoj kiaj antaŭ ol, post ol, anstataŭ ke, malgraŭ ke, tial ke, krom se, k.t.p, k.t.p.

La demandovortoj estas la k-korelativoj, kaj la subjunkcio “ĉu”. La frazo post :ĉu” estas ĉiam suborda frazo: “Mi ne scias, ĉu li venos” kaj “Mi dubas, ĉu” kaj “Mi demandis, ĉu li venos”. Kiam la demandvorto “Ĉu” komencas la frazon, oni povas diri ke temas pri elipsa ĉeffrazo forlasita: “(Mi demandas, volas scii), Ĉu vi estos hejme morgaŭ vespere? “, ĉar tiu

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

ĉu-frazo havas la formon kaj la funkcion de suborda frazo. Cetere troviĝas variaĵo: "Ci ankoraŭ ne manĝis, ĉu?", kaj "Ci jam manĝis, ĉu ne?". Kaj "Diru, ĉu jes aŭ ĉu ne!". Kelkfoje oni uzas la nedemandan formon kun la tono plialtiĝanta ĉe la fino, kiel en demandaj: "Ci tamen iros al la urbo? Kiom nesaĝa!"

Marcel Leereveld.



## El Perto

Kolektiĝis grupeto da ne-etnolingvo- sed ja Esperanto-parolantoj en kafejo ĉe la Ŝtata Biblioteko, la lastan sabaton en Januaro. Ni tre gojis bonvenigi Debra McCarney, eks-Pertano nun Kimrujano, kaj Aleksey Korolev, eks-Sankta Peterburgano, nun Pertano, komencanto sed tre avida kaj kapabla lernanto. Shayne Power, Lyndell Savage, Heather Long kaj mi ankaŭ ĉeestis.

Por ekzerci kaj la lingvo-scipovon kaj la cerbon, ni ludis "Tabuo"n. 😊 Sur la tablo, kontrolante ĉion kaj ĉiujn, estis nia verda amiko, Kroko 🐸 (de tempo al tempo mordetante anglavortoparolanton). Vera Payne



## Estimataj uzantoj de edukado.net

### La retejo denove funkcias

Mi kun ĝojo informas vin, ke la retejo denove funkcias. Studentoj de Poznan, kursanoj, ludantoj de RISKO denove povas labori kaj ludi.

Pardonpete pro la ĝeno kaj salute, Katalin Kovats, redaktoro



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



<http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine>

Vi bezonas nur 5 minutojn ĉiun tagon por tiu programo.

😊 ★★★

Metu la adreson en viajn preferatajn programojn kaj ĉiutage Klaku, Aŭskultu, Spertiĝu



**3ZZZ** En la elsendo de la 27a de januaro 2020 vi aŭdos

raporton pri la ĵus okazinta komuna Kongreso/Somerkursaro en Aŭklando de Jonathan Cooper kaj Franciska Toubale kaj kantojn de nova albumo produktita de Vinilkosmo "Kien vi iros ?" de Rafael

Milhomem de Brazilo



Franciska Toubale



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**